PASKO 1989:
Bel(g)aĵoj en Nederlando



Nederlanda Esperanto Junularo invitas vin al bela arbarplena regiono, kie situas dunacia(!) ejo. En la nederlanda provinco Noord-Brabant troviĝas kelkaj belgaj enklavoj, kiuj kune nomiĝas Baarle-Hertog. La landlimo trairas nian kongresejon, do, ni kuiros kaj dormos en Nederlando kaj manĝos kaj distros en Belgio!

Ĉirkaŭ la temo "Bel(g)aĵoj en Nederlando" NEJ, en kunlaboro kun FLEJA (Flandra Esperanto Junularo Asocio), organizos ekskursojn al Belgio kaj al Nederlando (i.a. al la unika ludkartmuzeo), prelegoj pri belgaj kaj nederlandaj tipaĵoj kaj granda tutkunvena diversspeca konkurso inter Belgio kaj Nederlando (eksterlandanoj elektu por kiu ludi).

Ĉiuj estas bonvenaj de la 24a ĝis inkluzive la 27a de marto 1989! Eksterlandanoj kiuj ŝatas resti pli longe en Nederlando indiku tion sur la aliĝilo kaj ni klopodos aranĝi loĝadreson por vi.

Ensendu la slipon al:
Ron Doesborg
Nederlandplein 41
5628 AE Eindhoven
tel: (+31)40-412890
(li povas pli detale informi vin)

Kaj antaŭpagu 25 ned.
guldenojn al:

Nederlandse Esperanto Jeugd - NEJ
ĝirkonto 2083685
Nederlandplein 41
Eindhoven

Nuligante vian aliĝon antaŭ
la 1a de marto vi rericevos
vian antaŭpagon minus 10 guldenojn.

La kotizoj estas (en ned. guldenoj):

NEJ-membroj ricevos rabaton de 5 guldenoj.

Jes, mi venos al Baarle-Nassau/Hertog.
Nomo:
Adreso:
Poŝtkodo: Urbo: Lando:
Naskiĝdato:

Mi alvenos je ___-3-89 kaj restos ĝis ___-3-89.
Mi jes/ne estas vegetarano.
Por eksterlandanoj: Mi ŝatas loĝi ĉe nederlandano ekde _____ ĝis _____.
Por nederlandanoj: Mi pretos loĝigi ___ eksterlandanojn ekde _____ ĝis _____.
Mi havas jenajn ideojn/kontribuojn por la programo: _____
_____
_____
Mi estas komencanto/progresanto/fluparolanto.
Mi verŝajne venos per trajno/aŭto/biciklo.
Dato: _____ Subskribo: _____.